

# ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

No. 9

## Praktika Frazaro

Dialogoj de la ĉiutaga vivo

Kunmetis J. Borel



Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.  
Berlin kaj Dresden

**Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.**  
**Berlin kaj Dresden**



---

---

## **Du gravaj gazetoj**

kiujn ĉiu Esperantano  
devus aboni, estas

### **Germana Esperantisto**

Monata gazeto por  
la disvastigo de la  
lingvo Esperanto  
kaj

### **Esperanto-Praktiko**

Monata gazeto por perfek-  
tigo en la Lingvo Internacia  
Ĉefredaktoro por ambaŭ  
**FRIEDRICH ELLERSIEK**

---

---



Oni postulu specimenajn  
numerojn, kunsendante po 5.— M germ.

2261.5401

# ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

---

---

No. 9

## Praktika Frazaro

Dialogoj de la ĉiutaga vivo

Kunmetis J. Borel

3a eldono

(11a—20a miloj)



1922

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.  
Berlin kaj Dresden

# Enhavo

---

	paĝo
Pri Esperanto . . . . .	3
Dum vojaĝo	
I. Alveno . . . . .	6
II. En la hotelo . . . . .	8
III. La manĝoj . . . . .	10
IV. La forvojaĝo . . . . .	12
En restoracio . . . . .	14
Serĉado de adreso . . . . .	16
Ĉe la dogana oficejo . . . . .	18
En bankoficejo . . . . .	21
Ĉe la meblo-vendisto . . . . .	24
Ĉe la juvelisto . . . . .	26
Moderna loĝejo . . . . .	29
Ĉe la telefono . . . . .	31
Pluva tago . . . . .	33
En kunsido . . . . .	36
Por fumantoj . . . . .	38
Pri la karaktero . . . . .	41
Patriotismo kaj ŝovinismo . . . . .	44



v. 11188



## Pri Esperanto

A. Esperantisto, B. skeptikulo.

A. Bonan tagon, amiko, jam de longe mi ne vidis vin.

B. Bonan tagon, mi tre ĝojas renkonti vin. Sed kion signifas tiu ĉi verda stelo en via buton-truo?

A. Ĝi estas la insigno de l' Esperantistoj.

B. De l' Esperantistoj...! Ĉu vi, kara amiko, estas partiano de tiu absurda afero, kiun oni nomas lingvo internacia?

A. Jes, ĉu tio mirigas vin?

B. Kompreneble, mi ja konas vin kiel saĝan, inteligentan homon.

A. Ĉu vi do kredas, ke nur sensaĝuloj povas interesiĝi pri lingvo internacia?

B. Ho, tion mi ne diris, sed mi kredas, ke ĝi estas belega utopio.

A. Kial do utopio?

B. Klare! Jen: Kiu civilizita popolo iam konsentos forlasi sian gepatran lingvon kaj uzi anstataŭe iun artefaritan lingvon?

A. Neniu...

B. Jen, vidu, vi mem konfesas tion; mia unua argumento detruis vian tutan hipotezon.

A. Tute ne, lasu min fini, mia kara. Neniu popolo forlasos sian lingvon, ĉar Esperanto estas nur helpa lingvo, uzota ekskluzive kun fremduloj, kiuj ne scias nian lingvon.

B. (ironie). Tre ĝentilaj estas la Esperantistoj, ke ili permesas al la naciaj lingvoj vivi; sed ŝajnas al mi pli bone, se ĉiuj popoloj lernus nian germanan lingvon, kiu jam estas parolata de milionoj da homoj.

A. Jes, ni Germanoj tion povas deziri; sed Angloj, Francoj, Hispanoj, Rusoj ktp. pensas, ke ilia propra lingvo havas la saman rajton. Kiu decidus? Kiu elektos?

B. Efektive, ne estus tre facile, kontentigi ĉiujn.

A. Krom tio, ĉu vi konas multajn fremdulojn, kiuj tute korekte kaj facile parolas la germanan lingvon? Nia lingvo estas malfacila por fremduloj.

B. Sed diru, ĉu via Esperanto estas multe pli facila?

A. La tuta gramatiko konsistas el 16 mallongaj reguloj, ĉiuj sen esceptoj, kaj ĉiu klera homo komprenas, sen antaŭa lernado, preskaŭ la tutan vortaron.

B. Tio ĉi ŝajnas al mi iom stranga, sed la ĉefa malfacilaĵo devenos de la pronuncado, ĉiu popolo elparolos la lingvon alimaniere.

A. Por preskaŭ ĉiuj nacioj Esperanto estas pli facile elparolebla ol iu alia lingvo.

B. Kiel tio estas ebla?

A. Tute simple: Esperanto ne uzas sonojn malfacilajn por tiu ĉi aŭ tiu nacio, ekzemple la

germanajn *ä, ö, ü*, la francajn *an, on, un*, la anglan *th* ktp. Plue, la akcento falas senescepte sur la antaŭlastan silabon de ĉiu vorto.

B. Mi konfesas, ke tio estas tre lerta ideo, ĉar per tiuj du reguloj oni forigas la du ĉefajn malfacilaĵojn, kiujn prezentas la ĝusta elparolado de fremdaj lingvoj. Tamen, restos ankoraŭ diferencoj en la parolmaniero de Anglo, Franco aŭ Germano.

A. Jes, restas malgrandaj diferencoj, sed ili absolute ne malhelpas la interkomprenon. Mi certe pli facile komprenas Francon aŭ Anglon parolantan Esperante, ol mi komprenus ilin parolantajn germane, eĉ post longa restado en nia lando.

B. Senmoke, mi trovas, ke ĉio ĉi estas vere interesa, kaj mi eble, pro scivolo, aĉetus Esperantan lernolibron, se mi estus riĉa.

A. Vi ne bezonas esti ekstreme riĉa. Se vi oferas nur du Markojn, vi jam povas aĉeti folion, kiu enhavas la tutan gramatikon kaj sufiĉan vortliston por ĉion kompreni.

B. Se mi ne konus vin, mi kredus, ke vi mensogas. Nu, bone, mi aĉetos la folion.

A. Se vi tion faros kaj tralegos atente, mi vetas, ke vi fariĝos Esperantisto.

B. Kiu scias? Oni ne plu rajtas dubi pri io, de kiam la homo flugas kiel birdo.

A. Vi estas prava. Adiaŭ! La proksiman fojon, kiam mi revidos vin, vi ankaŭ portos la verdan stelon!



## Dum vojaĝo

### I. Alveno

S-ro A., vojaĝanto; S-ro B., hotelmastro;  
S-ro C., pordisto.

C. (en la stacidomo, alparolante A.). Ĉu la Sinjoro volas loĝi en la hotelo „Krono“? Ĝi estas unuaranga hotelo, kun moderaj prezoj.

A. Ĉu tiu estas la hotelo mastrumata de S-ro B.?

C. Jes, Sinjoro, ĝi estas tiu ĉi.

A. Bone, en tiu okazo jen mia pakajbileto. Vi deprenu la pakajon kaj konduku ĝin al la hotelo plejeble baldaŭ.

C. Ĉu vi veturas per la omnibuso?

A. Ne, mi preferas piediri, se la vojo ne estas tro longa.

C. Estas apenaŭ du minutojn de ĉi tie.

A. Tiam mi piediros. Atentu zorge pri la pakajo. Kie estas la vojo?

C. Iru rekte antaŭen. Ĉe la Parkstrato, la kvina maldekstre, vi turnu kaj iru ĝis la hotelo, kiu havas numeron dek ok; vi tuj vidos grandan kronon super la enirejo.

A. Mi dankas pro la sciigo. (Iras al la hotelo.)

B. (en la hotel-oficejo). Estu bonvenanta, Sinjoro.

A. Bonan tagon. Ĉu vi havas ĉambron por mi, kaj je kiu prezo?



B. Ni havas ankoraŭ du aŭ tri disponeblajn; la prezo dependas de la situacio.

A. Mi deziras loĝi ne tro alte, sed ne estas necese, ke la fenestroj rigardu al la sudo.

B. Ni havas en la dua etaĝo numeron tridek kvin kun tre bela elrigardo al la ĝardeno; la prezo estas unu spesmilo kvindek por unu nokto.

A. Iom kara. Ĉu vi ne povus lasi ĝin por unu spesmilo? Por la dua etaĝo estas multe.

B. Mi bedaŭras, niaj prezoj estas fiksj, sed mi povas doni al vi, en la tria etaĝo, la numeron sepdek naŭ por unu spesmilo.

A. Estas al mi tro alte.

B. Ni havas lifton.

A. Mi preferas la numeron tridek kvin, por unu kaj duono.

B. Bone. Dum kiom da tagoj vi gardos la ĉambron?

A. Dum tri tagoj, se ĝi plaĉas al mi.

B. Ĉu vi manĝos en la hotelo aŭ ekstere? En tiu ĉi okazo ni devus kalkuli alpagon de 25 spesdekoj por tago.

A. Ne, mi manĝos en la hotelo, se la prezoj ne estas tro altaj.

B. Jen nia tarifo. Ni havas bonegan komunan tablon por unu spesmilo sesdek, kaj por du spesmiloj vespere, kunkalkulante duonan botelon da vino.

A. Bone. Kiom kostas la matenmanĝo?

B. Okdek spesdekojn.

A. Ĉu vi ne povus fari al mi prezon entutan por la tri tagoj?

B. Ne eble dum tiel mallonga tempo. Ni konsentas prezojn potage nur por restadoj de almenaŭ unu semajno.

A. Nu, mi akceptas viajn kondiĉojn, sed mi postulas zorgan servadon. Via hotelo estas rekomendita al mi de mia amiko Z. Mi esperas, ke vi pravigos lian rekomendon.

B. Mi estas certa, ke vi ne bedaŭros, ke vi loĝis ĉe mi.

A. Espereble. Ĉu mi povas tuj supreniri al mia ĉambro?

B. Oni kondukos vin tien (li sonorigas). Antaŭe bonvolu enskribi vian nomon en la libron de fremduloj.

## II. En la hotelo

La samaj personoj kaj F-ino D., ĉambristino.

F-ino D. (alvenante ĉe la sonorado de l'mastro). Jen mi estas. Kion vi deziras?

B. Konduku la Sinjoron al la numero tridek kvin.

F-ino D. Ĉu la Sinjoro volas veni? Ĉu jam estas la pakaĵoj tie ĉi?

A. Mi komisiis la pordiston, depreni ilin ĉe la stacidomo kaj ilin alporti.

B. Jen ili alvenas. (Al la pordisto.) Johano, portu la pakaĵojn al la numero tridek kvin.

F-ino D. Ĉu vi preferas supreniri piede aŭ lifte?

A. Piede. Mi ne ŝatas tiujn aparatojn.

D. Laŭ via deziro. Tien ĉi mi petas. (Ili alvenas al la ĉambro.) Jen la ĉambro.

A. Ĝi ŝajnas al mi iom malgranda.

D. Ĝi estas unu el la plej grandaj de l' hotelo. La butono de l' elektra lumo estas apud la lito, kaj tiu de la sonorilo apude.

A. Ĉu la littukoj estas puraj kaj sekaj?

D. Vi mem povas konstati tion.

A. Cimojn vi espereble ne havas?

D. Vi ŝercas, Sinjoro! La hotelo estas treege pura, kaj ni neniam havas plendojn.

A. Bonege! Plenigu la akvo-kruĉon, mi volas tuj min lavi.

D. Volonte. (Ŝi baldaŭ revenas kun poto da akvo kaj metas ĝin en la lavpelson, samtempe ŝi alportas freŝajn tukojn.)

A. Je kioma horo estas la komuna vespermanĝo?

D. Je la sepa kaj kvarono. Oni sonorigas je la sepa.

A. Kie estas la manĝoĉambro?

D. Sur la unua etaĝo, meze de l' koridoro.

A. Kaj la necesejo?

D. Ĉe la fino de l' koridoro, dekstre.

A. Dankon. Diru do al la pordisto, ke li veku min morgaŭ je la sesa.

D. Jes, Sinjoro. Ĉu oni devos pretigi la matenmanĝon por la sesa kaj duono?

A. Mi ĝuste volis tion diri. Mendu ĉokoladon. Ĉu estas kafejo en la domo?



D. Jes, unu pordo de l' kafejo malfermiĝas apud la oficejo.

A. Mi dankas vin.

D. Ĉu la Sinjoro ankoraŭ ion deziras?

A. Momente ne.

D. Tiam adiaŭ, Sinjoro.

### III. La manĝoj

La samaj personoj kaj E., kelnerino.

A. (sonoriginte du fojojn). Ĉie la sama afero! (al la alvenanta pordisto). Ĉu oni ne diris al vi, ke vi min veku je la sesa horo?

C. Mi ĝuste volis veni, kiam vi sonorigis. Estas nur la 6a 15. Mi pensis, ke la Sinjoro volonte dormos momenton plue.

A. Se mi devus forvojaĝi, mi maltrafus la vagonaron per via kulpo. Ĉu vi purigis miajn ŝuojn?

C. Jes, Sinjoro; mi tuj alportos ilin. (Li foriras.)

A. (vokante la ĉambristinon). Brosu rapide mian mantelon, ĝi estas kovrita de polvo.

D. Mi faros, Sinjoro.

A. Pretigu mian ĉambron kiel eble plej baldaŭ. Mi ricevos viziton hodiaŭ matene kaj deziras, ke oni ne trovu nefaritan liton kaj neordigitan ĉambron.

D. Laŭ via deziro, Sinjoro. La ĉambro estos aranĝata tuj post via foriro. (A. mal-supreniras al la manĝoĉambro.)

E. Bonan matenon. Per kio mi povas vin servi?

A. Ĉu oni hieraŭ ne mendis ĉokoladon por mi?

E. Jes, Sinjoro, sed la ĉokolado ne estas ankoraŭ preta.

A. Tiam donu al mi kafon kun lakto; alportu ankaŭ sukeron.

E. Bone, Sinjoro. (Ŝi servas lin.)

A. Ĉu vi ne havas freŝan panon anstataŭ tiuj ĉi bulketoj?

E. Ho jes, ni havas.

A. Alportu ankaŭ konfitaĵon, mi ne tre ŝatas buteron nek mielon.

E. Jen, Sinjoro.

A. (kiu finis matenmanĝi). Je kioma horo oni tagmanĝas?

E. Je la dek-dua, tute precize.

A. Dankon. (Li eliras, faras siajn negocojn kaj revenas je la dek-dua por la tagmanĝo.)

E. Ĉu vi deziras vinon, Sinjoro?

A. Certe. Alportu la vinkarton. (Rigardinte ĝin.) Donu al mi duonan botelon da Burgonja vino kaj ankaŭ unu botelon da Selters.

E. Kiel vi deziras.

A. (al sia maldekstra najbaro). Ĉu vi bonvolus, kiam vi mem havos panon, pasigi al mi la pankorbeton? Mi dankas.

B. Bonan tagon, Sinjoro. Ĉu vi bone dormis?

A. Tre bone, dankon. La lito estas komforta kaj la manĝo bonega. Mi rekomendos la hotelon al miaj amikoj kaj konatoj.

B. Mi tre ĝojas aŭdi tion.

#### IV. La forvojaĝo

La samaj personoj.

A. (kiu sonorigis). Volu diri al la pordisto, ke li prenu miajn pakaĵojn. Mi forveturos per la vagonaro de la sesa tridek kvin.

F-ino D. Mi tuj faros. (Ŝi volas foriri.)

A. Atendu momenton. Jen via trinkmono.

D. Sinceran dankon. Vi estas tro bona, Sinjoro.

A. Atendu ĝis kiam vi scios, kiom vi ricevas antaŭ ol protesti. (D. eliras, la pordisto alvenas.)

C. Kion vi deziras, Sinjoro?

A. Portu miajn pakaĵojn al la stacidomo kaj enregistrigu ilin por Z. per vagonaro de la 6a 35. Jen du frankoj por la kostoj.

C. Kie mi redonos al vi restantan monon?

A. Sur la perono. Mi estos tie post dek minutoj. Prizorgu bone la enregistrigon kaj ne perdu la bileton.

C. Vi povas esti trankvila, Sinjoro. Mi prizorgos la aferon, kvazaŭ ĝi estus por mi. (Li foriras.)

A. (malsuprenirinte al la oficejo). Volu peti la mastron, ke li venu tien ĉi.

B. Jen mi estas por via servo. Kion vi deziras?

A. Pagi mian fakturon. Mi forvojaĝos post dudek minutoj.

B. Jam tiel baldaŭ?

A. Mi devas; miaj negocoj vokas min al Z.

B. Ĉu vi deziras veturi per la omnibuso?

A. Ne, la stacidomo estas tute proksima. Mi preferas iri piede. Ĉu vi havas mian fakturon?

B. Jen ĝi estas.



A. (ekrigardas ĝin). Ĝuste. Jen bankbileto de cent frankoj, bonvolu ĝin ŝanĝi.

B. Ĉu vi ne havas monerojn?

A. Ne sufiĉe. Redonu al mi oron, mi petas, se vi havas.

B. Tre volonte.

A. Ĉu nenio alvenis por mi?

B. Mi kredas, ke ne. Mi iras vidi. (Revenas kun ilustrita poŝtkarto.) Jes, alvenis tio ĉi, sed nenio alia.

A. Dankon. Se eble alvenos ankoraŭ io por mi, mi petas sendi ĝin al hotelo „Tri Reĝoj“ en Z.

B. Mi prizorgos tion.

A. Adiaŭ, Sinjoro.

B. Aŭ, pli bone, ĝis la revido. Espereble vi revenos al ni ĉe la proksima travojaĝo en nia urbo.

A. Tute certe. Mi estas tre kontenta pri mia restado ĉe vi.

B. Mi ĝojas. Ĝis revido kaj feliĉan vojaĝon.

A. (alveninte ĉe la stacidomo, al la pordisto). Ĉu ĉiuj miaj pakajoj estas enregistritaj?

C. (transdonante la ricevateston). Vidu mem, Sinjoro.

A. Vi estas komplezema homo. Jen por vi.

C. Koran dankon, Sinjoro.

A. Nur ne forgesu veki min alian fojon je la dirita horo.

C. Kiam la Sinjoro revenos, li jam vidos, ĉu mi ne vekos lin ĝustatempe; eĉ duonan horon pli frue, se li deziras.

A. Nu, tio estus iom tro da fervoro. Adiaŭ!

## En restoracio

Ĉe komuna tablo;

S-ino A., S-roj B. kaj C., vojaĝantoj.

S-ino A. Kelnero, kiam vi alportos al mi la botelon da minerala akvo, kiun mi mendis?

Kelnero. Pardonu, Sinjorino, mi ĝin tute forgesis. Tuj mi alportos ĝin.

S-ro. B. Kelnero, donu al mi botelon da Rejna vino.

Kelnero. Tuj, Sinjoro.

S-ro C. Kelnero, donu la vin-karton.

Kelnero. Jen ĝi estas.

S-ino A. Kelnero, alportu do manĝokarton. Vi ne metis unu ĉe tiu ĉi tablofino.

Kelnero. Mi bedaŭras tiun forgeson, Sinjorino. Jen menuo, pardonu.

S-ino A. Ĉu ni estos fine servataj hodiaŭ aŭ ne? Al mi urĝas, kaj de pli ol kvarona horo mi atendas la supon.

Kelnero. La supo alvenos post momenteto, kaj mi petas vin, pacienciĝi ankoraŭ unu minuton.

S-ro C. (rigardinte la vinkarton). Ĉiuj tiuj vinoj estas tro karaj. Ĉu vi ne havas ordinaran vinon?

Kelnero. Ni ne donas ĝin ĉe komuna tablo.

S-ro C. Tiam mi ne trinkos vinon.

Kelnero. Ni havas bonan Burgonjan vinon, po 80 spesdekoj por botelo.

S-ro C. Alportu duonan botelon.

Kelnero. Bone, Sinjoro. (Li foriras. Oni ĵus alportis la supon.)

S-ro B. Tiu ĉi supo estas tute sengusta. Kelnero, salon!

S-ino A. (komplezema). Jen la salujo, Sinjoro.

S-ro B. Mi bedaŭras, Sinjorino, ke vi havas la penon, kaj mi dankas pro via afableco.

S-ino A. Vere ne meritas.

S-ro B. Ĉu vi prenas salon, Sinjorino?

S-ino A. Ne, dankon, laŭ mia gusto la supo estas sufiĉe spicita.

S-ro B. Mi ne opinias same. Pri gustoj kaj koloroj ne disputu, ĉu ne vere? Kaj vi, Sinjoro, ĉu vi deziras, ke mi pasigu al vi la salujon?

S-ro C. Koran dankon, ne; jam enestas tro da salo. Sed bonvolu doni al mi la raspitan fromaĝon.

S-ro B. Tre volonte, Sinjoro.

S-ro C. Mi tre dezirus scii, kiu estas la hodiaŭa menuo.

S-ino A. Oni jam forprenis la karton, sed mi memoras: almanĝaĵoj, salmotruto, rostbifo kun pizoj, kokidaĵo kun salato, glaciaĵo, fromaĝo ktp.

S-ro C. Mi estas al vi danka pro viaj informoj, Sinjorino. Kelnero, donu do al mi dentopurigilon.

S-ro B. Kaj al mi botelon da glacia akvo; mi trinkas nur freŝan akvon.

S-ro C. La fiŝo estis bonega.

S-ino A. La saŭco fakte estas bone farita kaj ĝustamezure spicita.



S-ro B. Mi preferas, kiam ĝi enhavas kaporojn.

S-ro C. Kelnero, kial vi ne ŝanĝas miajn forkon kaj tranĉilon?

Kelnero. Pardonu, mi forgesis preni vian manĝilaron.

S-ro B. Vi do pasigas vian vivon forgesante! Tamen vi certege ne forgesos alporti al mi la fakturon.

Kelnero. Tuj, Sinjoro.

---

## Sercado de adreso

A., nove alveninta vojaĝanto; B., C., D., pasantoj.

A. (levante la ĉapelon, al pasanta B.). Pardonu, Sinjoro, ĉu mi povas peti de vi informon?

B. Volonte, kion vi deziras?

A. Mi devas iri al S-ro Z., X-strato. Ĉu vi povus diri al mi, kien mi devas direkti min.

B. Tre facile. Iru rekte antaŭen ĝis la kvina strato maldekstre kaj marŝu laŭlonge tiun ĉi lastan ĝis la urbodomo.

A. Kiel mi ekkonos la urbodomon?

B. La konstruaĵo rimarkiĝas per sia originala arkitekturo. Vi vidos super la ĉefpordo frontonon kun la urbaj insignoj.

A. Kaj de tie, kien mi iros?

B. Vi certe trovos iun, kiu montros al vi la vojon. La X-strato estas sufiĉe malproksima, sed la domo Z. estas tre konata en la kvartalo.

A. Koran dankon pro via komplezo, Sinjoro. (La interparolantoj salutas sin reciproke; A. iras rekte antaŭen ĝis la kvina strato maldekstre; tie li alparolas S-ron C.)

A. Permesu, Sinjoro, ĉu tiu ĉi estas la vojo al la urbodomo?

C. Jes, sed se vi ne konas la domon, mi timas, ke vi ĝin iom malfacile trovos.

A. Oni ĵus diris al mi la malon. Ĉu vi eble konas iun, kiu povus konduki min tien?

C. Mi ĝuste devas tien iri, mi akompanos vin.

A. Tre afabla vi estas, kaj mi dankas. (Ambaŭ iras kune.) Oni diris al mi, ke la urbodomo distingiĝas per originala arĥitekturo.

C. Pli-malpli; la fasado sur la strata flanko estas tre simpla. La ĉefa fasado rigardas al placo sur la alia flanko.

A. Sed ĉu ne estas super la ĉefpordo frontono kun la urbaj insignoj?

C. Jes, vere; sed per la tempo ĝi iom elviŝiĝis; vidu mem.

A. Efektive, de tie ĉi la konstruaĵo ne prezentas ion eksterordinaran. Permesu, ke mi ankoraŭ uzu vian servemon. Ĉu vi povus diri, kie estas la X-strato?

C. Mi bedaŭras, ne povi informi vin. Mi ne loĝas en tiu ĉi kvartalo kaj ne konas ĉiujn stratnomojn.

A. Vi tamen eble konas la magazenon de -ro Z.?

C. La nomo estas al mi tute nekonata, sed mi sendube trovos iun, kiu montros la vojon. Adiaŭ, Sinjoro!

A. (turnante sin al S-ro D., kiu pasas). Pardonu, Sinjoro, ĉu vi konas S-ron Z., negociston?

D. Ĉu la S-ron Z., kiu loĝas en la X-strato?

A. Jes, tiun ĉi.

D. Estas tre malproksime de tie ĉi.

A. Tiam mi eble havos penon por trovi alian loĝejon?

D. Ne, sed vi devos multe marŝi. Iru dekstren tra la strato apud tiu fontano. Vi iros ĝis la fino. Tie ĉiu persono montros al vi la X-straton, kiu komenciĝas tute proksime. La magazeno de S-ro X. estas en la tria domo.

A. Sinceran dankon pro via afabla sciigo. (Li daŭrigas sian vojon. Alveninte ĉe la stratfino, li ekvidas la nomon de la X-strato kaj tuj poste la ŝildon de la magazeno Z. Li alvenis al la celo.)

---

## Ĉe la dogana oficejo

A., dogana oficejestro; B., dogana oficisto;  
C., D., E., F., vojaĝantoj.

A. Atentu oficistoj! La vagonaro alvenas nun. La vojaĝantoj tuj venos por la dogana vizito. Mi petas vin, esti hodiaŭ tre atentaj, ĉar, laŭ ricevita raporto, aro da lertaj kontrabandistoj vojaĝas en nia regiono.

B. Bone, ni malfermos la okulojn. Kio estas ilia kontrabandaĵo?

A. Ĉiuspecaj komercaĵoj, poŝhorloĝoj, tabako kafo. Oni ne scias, ĉu ili sukcesas kontrabande



enkonduki ilin sub nia nazo aŭ per kaŝitaj vojoj. Ĉiuokaze, ili trapasas la landlimon nekap- tite. (La vagonaro alvenas, la vojaĝantoj eliras kaj venas al la doganejo.)

B. (al la unua). Ĉu vi havas ion por deklari, Sinjoro?

D. Ne.

B. Malfermu vian valizon.

D. Ho, ne penvaloras. Ĝi entenas nur uzitajn vestaĵojn kaj kelkajn objektojn por la vojaĝo.

B. Malfermu tamen, mi diras, kaj rapide.

D. Nu, jen! Sed estu pli ĝentila, mi petas; mi ja ne estas krimulo.

B. (Trarigardas kaj malordigas la tutan en- havon de la valizo.) En ordo, vi povas trairi. (Li faras per kreto signon sur la valizo.)

E. (humila). Mi havas tute nenion por de- klari, Sinjoro doganisto, kiel vi mem povas kon- stati. (Li larĝe malfermas sian valizon sur la tablo.)

B. (malkonfidema, mallaŭte). Via afableco ŝajnas al mi suspektinda, Sinjoreto! (Li esploras la tolaĵon kaj eltiras oran poŝhorloĝon.) Ho, ho! Kio do estas tio ĉi?

E. (ridetante). Poŝhorloĝo.

B. (severe). Jes, jes, mi jam vidas. Sed vi asertis, ke vi havas nenion por deklari.

E. Mi volas klarigi. Estas nur donaco por nia karulino, kaj mi esperis pasigi ĝin senpage. Ĝen la tuta afero.

B. Mi komprenas! Nu, Sinjoro, via karulino ĉi ricevos sian donacon; mi konfiskas la poŝhor- loĝon kaj faras protokolon kontraŭ vi.

E. Vi ne havas la rajton forpreni la poŝhorloĝon.

B. Juĝisto decidis, ĉu oni ĝin konfiskos aŭ ĉu vi pagos punmonon. Atendante ni gardas la pruvilon.

E. Tio estas maljusta. Mi protestas.

B. Protestu, kiom ajn vi volos, vi ekscios, kiom ĝi kostas por trompi la ŝtaton. Nun ni ankoraŭ esploros viajn poŝojn.

E. Abomene! (Oni traesploras kaj tiras iom post iom el la poŝoj alian poŝhorloĝon, cigaredojn kaj cigarojn.)

B. Via afero estas pli grava ol ni pensis. Vi estas elmetita al severa puno. Diru vian nomon, antaŭnomon kaj precizan adreson.

E. Mi rifuzas.

B. Tiam vi estos arestata.

E. Ne necese, mi submetiĝas. Mia nomo estas Julio Emilo E..., loĝanta en X.

B. Ĉu vi havas leteron adresitan al vi aŭ alian legitimigan skribaĵon por certigi la verecon de via diro?

E. La parolo de honesta homo devus sufiĉi. (Ridoj). Jen mia vizit-karto.

B. Bone. Via diro estas vera. Restu al mi a dispono.

E. (elirante). Alian fojon mi estos pli sirgardema. (Intertempe A. pridemandas Fraŭlinon F.)

A. Ĉu vi havas ion impostotan, Fraŭlino F-ino F. (iom konfuza). Ne, Sinjoro. Aŭ pli verjes. Mi havas ĉokoladon kaj kelkajn frandaĵetojn.

A. (ridetante). Tiuj objektoj estas liberigitaj de limdepago. Ĉu nenion alian?

F-ino F. Ne, Sinjoro, en tiu saketo mi havas ankoraŭ du paketojn da cigaredoj por mia frato.

A. Por ili vi devas pagi laŭtarife. (Ŝi pagas.) Kaj en viaj vestaĵoj, ĉu vi havas nenion impostotan?

F-ino F. Mi? Ne.

A. Bone, vi povas iri.

F-ino F. (elirante, al si mem). Li ne vidis la poŝhorloĝon kaŝitan en mia korsaĵo. Mi faras hodiaŭ bonan profiton.

---

## En bankoficejo

A., rentulo; B., bankoficisto.

A. Bonan tagon.

B. Bonan tagon, Sinjoro. Kion vi deziras?

A. Mi deziras scii, ĉu mi povas deponi valor-paperojn en via instituto?

B. Ni akceptas depone kaj prizorgas ĉiuspecajn valor-paperojn, kondiĉe ke oni donu ilin al ni malfermite. En mala okazo vi devus vin turni al nia sekcio por fermitaj deponaĵoj, strato . . .

A. Temas nur pri malfermita depono. Mi do venis al la ĝusta adreso.

B. Ĉu vi havas la paperojn kun vi?

A. Jes, jen ili. (Li eltiras diversajn valor-paperojn el sia poŝo kaj transdonas ilin al la oficisto.)



B. Laŭ nia regularo la deponantoj devas prezenti, kune kun ĉiu valoraĵo, liston kun la numeroj, jaroj, kaj pagdatoj de la procentaĵoj.

A. Ĉu vi havas specialajn formularojn por tio?

B. Jes, Sinjoro. Jen kelkaj. Sur la tablo, en la angulo maldekstre, vi trovos inkon kaj plumojn. Havu la afablecon, starigi la liston tre precize kaj poste ĝin doni al mi; mi mem poste plenigos la ceterajn rubrikojn.

A. (prenante la formularon). Dankon. (Li iras al la montrita tablo kaj revenas post momento.) La listoj estas pretaj, Sinjoro. Mi esperas, ke ili estas laŭregule faritaj.

B. Bonvolu sidiĝi momenton, mi tuj revizos ilin. (Komparinte la listojn kun la paperoj.) Tre bone, Sinjoro, ĉio en ordo. Se vi havas la bonecon, ankoraŭ iom atendi, vi povos kunpreni la depon-atestojn.

A. Kiom da tempo ĝi postulos ĉirkaŭe?

B. Dudek minutojn ĝis duonon da horo.

A. Tio estas iom longa.

B. Se vi eble havas ion por fari en la proksimeco, vi povus tien iri por eviti perdon de tempo. La depon-atestoj estos pretaj, kiam vi revenos.

A. Ĝis kioma horo via oficejo estas malfermita?

B. Ĝis la unua posttagmeze.

A. Tre bone, tio estas tre konvena. Mi revenos iom pli malfrue. Permesu al mi ankoraŭ kelkajn demandojn.

B. Volontege.

A. Kiom vi kalkulas por la maklero?

B. Duonon por milo, pojare, de la nominala valoro de l' paperoj; komencita jaro estas kalkulata kiel plena.

A. Mi konsentas pri viaj kondiĉoj. Ĉu mi devas pagi kontante la unue pagotan makleron?

B. Tio ne estas necesa. Ni debetos vian konton kaj deprenos poste la sumon ĉe la kontreguligo.

A. Kiel mi ricevos la procentaĵojn?

B. Ni detranĉos ĉiun kuponon ĉe le pagdato kaj enkasigos la sumon, kiun ni enskribos en vian krediton, avizante vin. Vi tiam povos laŭvole disponi pri via kredit-havo.

A. Kion vi komprenas per „laŭvole“?

B. Mi volas diri, ke vi povos enkasigi la monon rekte ĉe nia pagejo aŭ sendigi ĝin poŝte, laŭ via bonplaĉo. Vi ankaŭ povos transportigi la sumojn en la krediton de alia firmo aŭ transdonigi ilin al iu persono, kiu havas negocajn rilatojn kun ni.

A. Tio ĉi estas tre praktika kombino, kaj mi ĝin uzos laŭ la cirkonstancoj. Mi do revenos post duona horo.

A. (revenante post kvarona horo). Mi povis fini mian aferon pli rapide ol mi pensis. Ĉu mi jam povas ricevi la depon-atestojn?

B. (donas ilin). Jen ili estas, Sinjoro. Mi esperas, ke vi havos plenan kontentecon pri viaj rilatoj kun nia firmo, kaj ke vi fariĝos fidela kliento nia.

A. Mi ankaŭ esperas kaj eĉ kredas, ke ni havos multajn negocojn por trakti kune. Ĝis revido, Sinjoro. (Li forlasas la oficejon, kaj la oficisto lin akompanas ĝis la pordo kun multaj riverencoj.)

---

## Ĉe la meblo-vendisto

S-ro A., meblo-vendisto;

S-ro B. kaj Fraŭlino C., gefianĉoj.

A. Bonan tagon, Gesinjoroj. Per kio mi povas servi al vi?

B. Ni deziras aĉeti kompletan meblaron.

A. Tre bone. Ni havas ĉion, kion vi bezonas. Kiom da ĉambroj vi volas mebli?

B. Kvar: unu dormo-ĉambron, unu manĝo-ĉambron, unu saloneton kaj unu skriboĉambron.

A. Ĉu vi jam havas la meblojn por la kuirejo?

B. Ne, ni ankoraŭ bezonos kelkajn taburetajn kaj unu tablon.

A. Ĉu vi jam elektis stilon?

C. Ne, ni deziras vidi modelojn antaŭ ol ion decidi.

A. Bone. Jen ilustrita katalogo kun ĉiuj fiksjaj prezoj por kompletaj ĉambroj aŭ unuopaj mebloj. Ĉe kontantaj aĉetoj ni donas rabaton de du procentoj.

B. Ni intencas vidi, kion vi havas en la magazeno.



A. Mi ankaŭ intencas montri al vi ĉion. Sed kelkaj mebloj estas faritaj nur laŭ mendo; pro tio mi donas al vi tiun ĉi katalogon, kiun vi povos trarigardi laŭvole. Povas esti, ke iu aŭ alia modelo pli multe plaĉos al vi.

C. Vi estas prava, mi dankas.

A. Mi montros al vi kelkajn modelojn de dormo-ĉambroj en stiloj Ludoviko XVa kaj Ludoviko XVIa, el nuksarba ligno polurita kaj vak-sita, laŭ plaĉo.

C. Mi preferus modernan ĉambron el nuksaĵo kaj atlaso kun ligna mozaikaĵo.

A. Tion ni havas. Ni ankaŭ havas blanke lakitajn ĉambrojn kun belegaj ornamoj bluaj aŭ alikoloraj; dormo-ĉambrojn el kverkaĵo polurita aŭ senbrila, skulptitajn aŭ tornitajn meblojn, aliajn ornamitajn per pirogravuro. La katalogo entenas tre plenan sortimenton en ĉiuj specoj. Vidu, ni eĉ havas meblojn el abiaĵo kun desegnoj.

B. Ĉu vi ankaŭ faras grandajn, duoblajn litojn?

A. Mi konsilas al vi prefere paron da litoj, ili estas multe preferindaj en ĉiu rilato.

B. Ĉu la katalogaj prezoj entenas ankaŭ la litaĵon, matracojn, kusenojn, lanugajn kovrilojn?

A. Ne, Sinjoro. Ni ĉiam vendas ilin aparte. El kio devas konsisti via dormo-ĉambra meblaro?

C. El unu paro da litoj, ĉar vi ilin rekomendas, du tabletoj kun marmora supraĵo, unu spegulŝranko, unu granda lavotablo ankaŭ kun spegulo, kvar seĝoj kaj unu dorm-sofo.

A. Bone, post unu momento mi ĉion ĉi montros al vi. Kaj por la manĝo-ĉambro?

B. Meblaro el vera kverkaĵo: unu granda, praktika ŝranko kun vitroj por la manĝilaro, unu plilongigebla tablo, unu servotablo kaj ses seĝoj kun leda sidpeco.

A. Ni certe povos bone provizi vin. Kaj por la salono?

C. Unu kanapo, du brakseĝoj, kvar seĝoj, ĉio el lana tapiŝo-ŝtofo; unu ronda tablo, salon-ŝranketo kun vitropordoj kaj unu kudrotabloteto.

B. Por la skriboĉambro montru al mi skrib-tablon, libroŝrankon, tablon kaj seĝojn el la sama sortimento.

A. Volonte. Nun ni faru rondiron tra la meblejoj. Bonvolu veni. Vi espereble trovos ĉion laŭ via gusto.

---

## Ĉe la juvelisto

S-ino A. Ĉu vi povas sendi al mi hejmen por elekto sortimenton da donacoj por edziĝontoj?

S-ro B. Kun plezuro. Tamen, estus bone, se vi povus diri al mi, kian specon da objektoj vi deziras donaci.

A. Mi ankoraŭ ne estas tute decidinta; tio dependos de la aspekto kaj prezo de la objektoj.

B. Kiom vi volas dediĉi proksimume?

A. Ĉirkaŭ kvindek spesmilojn.

B. Por tiu prezo ni havas tre belajn juvelujojn kun arĝentaj manĝiloj.

A. Mi kredas, ke miaj amikoj jam estas abunde provizitaj je tiaj aĵoj. Ili ricevis sortimentitan manĝilaron: tranĉilojn, grandajn kaj malgrandajn kulerojn, forkojn, sup-kuleregojn, tranĉilaron ktp.

B. Ni havas skatolon kun belega servilaro por almanĝaĵoj el orita arĝento.

A. Miaj amikoj jam havas tion, kaj verŝajne ne uzos ĝin ofte.

B. Ni serĉu ion alian. Jen belega kafujo aŭ teujo samspeca el arĝentizita metalo, garantiita daŭremo; ĝi estus tre bela donaco.

A. Ili jam ricevis ambaŭ ujojn, ankaŭ sukerujon, eĉ suker-prenilon.

B. Jen pankorboj, pokaloj kaj pletoj ĉiuspecaj, biskvit-skatoloj, kiuj ne estas tre karaj kaj tamen faras belan efekton.

A. Metu flanken tiun ĉi arĝentan pleton. Ĝi estas vere bongusta. Kiom ĝi kostas?

B. Por vi mi lasos ĝin por sesdek spesmiloj.

A. Estas iom kare.

B. Nu, ni diru kvindek sep. Ĝi estas mia plej malalta prezo.

A. Sendu ĝin. Ĉu vi havas nenion alian je tiu prezo?

B. Jen stan-pladoj. Nuntempe estas stano tute laŭmoda, kaj vi vidas, ke tiuj pladoj estas tre belete faritaj. Mi lasos la paron por kvindek kvin spesmiloj ankaŭ.



A. Sendu ilin ankaŭ por elekto.

B. Ni havas ankoraŭ belajn vazojn el Bohema kristalo muntitajn kun arĝento, ornamaĵojn por fajrejoj, statuetojn.

A. Ne, mi preferas donaci ion utilan.

B. Tiam, jen estas tre praktika oleujo por oleo, vinagro, salo kaj pipro.

A. Tio plaĉas al mi. Kioma estas la prezo?

B. Kvardek tri spesmiloj, plej malalte.

A. Sendu ĝin. Sed nun mi havas sufiĉe.  
— Ĉu mia ringo estas riparita?

B. Bedaŭrinde ankoraŭ ne. La ŝtono estas malfacile remetebla. Mi devis ĝin sendi al fakjuvelisto.

A. Mi havas broĉon, kies muntaĵo mal-lutiĝis; ĉu vi povas ĝin ripari?

B. Tre facile. — Ĉu mi povas ofri al vi ion alian, Sinjorino? Ni ricevis belan sortimenton da oraj kaj arĝentaj braceletoj, ĉenoj kaj ĉenetoj, medalionoj, orelringoj je ekstreme favoraj prezoj. Profitu la okazon; la firmo, kiu ilin liveras, kontentiĝas kun tre malgranda profito, por konatigi siajn fabrikaĵojn. Pli malfrue ili plikariĝos.

A. Mi dankas; nun mi bezonas nenion... Tamen, jes. Mi promesis al mia filineto arĝentan pendojuveleton. Ĉu vi povas montri al mi tiajn?

B. Jen tuta aro por elekti.

A. Kia rava pulĉineleto!

B. Ĝi estas artikigita. Sufiĉas tiri la ĉeneton.

A. Kiom ĝi kostas?

B. Du spesmilojn kvindek.

A. Mi prenas ĝin. Enskribu ĝin en mian fakturon.

B. Ĉu nenion alian vi bezonas?

A. Hodiaŭ ne. Kiam mi ricevos la objektojn?

B. Post unu horo, plej malfrue.

---

## Moderna loĝejo

A. Ĉu vi fine trovis la tiel longe serĉitan loĝejon?

B. Ne tute laŭ mia gusto; mi trovis unu, kiu preskaŭ konvenas, sed mi opinias, ke la luprezo estas abomene alta.

A. En kiu kvartalo ĝi estas?

B. En la Z-strato, No. 25. Estas loĝejo kun kvar ĉambroj en la dua etaĝo.

A. Ĉu ĝi estas aranĝita kun ĉiu moderna komforto?

B. Jes. Ĉiuj ĉambroj havas elektran lumigadon, escepte de la kuirejo, kiu posedas gasinstalon.

A. Ĉu estas banĉambro?

B. Jes, ĉe la fino de l' koridoro.

A. Ĉu la loĝejo estas bela?

B. La tapetoj estas bongustaj kaj tre modernaj, la plafonoj belete ornamitaj, kaj altaj kontraŭmuraj lignaĵoj en la ĉefaj ĉambroj donas al ili komfortan aspekton.

A. Ho, ho! Tiam mi bone komprenas, ke la loĝejo estas kara.

B. Mi forgesis diri, ke estas akvo en la kuirejo kaj en ĉiu ĉambro aparatoj de l' centra hejtado.

A. Sed tio estas ja ideala loĝejo, kaj kiom ĝi kostas ĉiujare?

B. La bagatelan sumon de mil kvincent spesmiloj.

A. Ĉu la centra hejtado estas enkalkulita en tiu ĉi prezo?

B. Kompreneble!

A. Vere mi opinias, ke la prezo estas tute modera, se la ĉambroj ne estas tro malgrandaj.

B. Unu estas longa 6 metrojn kaj larĝa 5 metrojn, alia estas duon-metron pli larĝa. La du ceteraj ĉambroj mezuras proksimume po 20 kvadrat-metrojn.

A. Kaj vi pensas, ke tiu luprezo estas tro alta?

B. La kvartalo estas iom malcentra.

A. Sed ĝi estas kvartalo de l' estonteco. Baldaŭ oni instalos tie poŝt-oficejan filion, kaj la stacidomo ne estas malproksima.

B. Jes, sed la centro de l' negocoj estas multe pli oriente.

A. Ĝi ŝoviĝas pli kaj pli al la okcidento.

B. Mi konfesas, ke la loĝejo plaĉus al mi, se ĝi kostus ĉirkaŭ cent kvindek spesmilojn malpli.

A. Por tiu prezo vi neniam trovos apartamenton kun la samaj avantaĝoj.



B. Nu, mi volonte fordonus kelkajn. Mi preferus hejti mem. Krom tio la domo estas granda kaj la loĝantoj multaj, jen fonto de senfinaj malagrabloj; plue ĝi estas brua, kaj tio estas netolerebla.

A. Estas efektive seriozaj malbonaĵoj, sed oni trovas la samajn en preskaŭ ĉiuj ludomoj, kaj kompare kun la grandaj avantaĝoj de la modernaj loĝejoj rilate al la malnovaj, ili ne estas konsiderindaj.

B. Tion mi ankaŭ diris al mi, kaj verŝajne mi fine luprenos la apartamenton, sed mi klopodos atingi rabaton.

---

## Ĉe la telefono

A. kaj B., abonantoj; F-ino X., telefonistino.

A. (sonorigas).

F-ino X. Centra oficejo tie ĉi.

A. Numeron ducent kvindek sep, mi petas.

X. Okupita; mi revokos vin.

A. Diable! Tio urĝas! Donu intertempe la numeron mil cent dek tri.

X. Ĝi ankaŭ estas okupita.

A. Sendube la numero trimil ducent dek ankaŭ estas okupita!

X. Ne, Sinjoro, ĝi estas libera, ĉu vi deziras la komunikon?

A. Jes, sed rapidu, antaŭ ol oni ĝin prenos.

X. Bone (ŝi interrilatigas ambaŭ abonantojn).

B. Kiu vokas?

A. Bonan tagon; estas mi.

B. Bonan tagon; kiu mi?

A. Via amiko Julio.

B. Ha! Kiel vi fartas?

A. Sufiĉe bone, mi dankas, kaj vi?

B. Ankaŭ bone. Sed kredeble vi ne vokas min por paroli pri nia sanstato?

A. Efektive. Mi... Nu, oni interrompis la komunikon (sonorigas). Fraŭlino, kial vi tranĉis la komunikon kun numero trimil ducent dek?

X. Mi petas pardonon, mi kredis, ke oni sonorigis por ĉesigi la interparolon.

A. Tute ne. Tuj revoku mian kunparolanton. — Ĉu estas vi? — Jes. — Oni interrompis nin. Jen la afero: Mia edzino aranĝas hodiaŭ grandan vespermanĝon.

B. Mi tre ĝojas.

A. Lasu min fini. Ni esperas vian ĉeeston.

B. Bedaŭrinde vi venas iom malfrue, mi jam disponis pri mia vespero.

A. Ne koleru, mi petas, ke ni ne invitis vin pli frue. La frato de mia edzino... Denove interrompitaj! Netolereble! (sonorigas). Fraŭlino, kial vi ĉesigas la komunikon ĉiumomente? Mi plendos al la administracio.

X. Tiun ĉi fojon mi klare aŭdis la signalon.

A. Via aparato estas difektita. Nun lasu nin paroli aŭ mi plendos!... Ĉu vi estas tie?

Oni denove tranĉis nian interparolon. Mi ĵus diris, ke la frato de mia edzino, via amiko R., hodiaŭ tute neatendite alvenis.

B. Ho, tiu karega amiko! Kiel li fartas de post sia reveno el Afriko?

A. Tute bone, sed ĉar li jam baldaŭ devas ree forvojaĝi, li deziras antaŭ sia foriro saluti kelkajn amikojn.

B. Kial vi ne tion diris tuĵ? Mi aranĝos por veni. Je kioma horo?

A. Je la sepa tridek, en ordinara vesto. Do, por li vi havas tempon, sed por ni...

B. Ne ĉagrenu, mi timis enuigi vin, vi invitas min tiel ofte.

A. Do, en ordo. Ĝis hodiaŭ vespere.

B. Ĝis la vespero kaj dankon (sonorigas).

X. Sinjoro, la numero mil cent dek tri estas nun libera.

A. Ĉu eble! Mi tion notos en la kalendaro... Du komunikoj sinsekve! Do voku la abonanton, mi petas.

(Kaj tiel plu.)

---

## Pluva tago

S-ino A., pretiĝanta por eliri; Anna, servistino;  
S-ro C., vizitanto.

S-ino A. Anna, pretigu la vespermanĝon por la sepa; mi revenos de mia promenado je la sesa kaj duono.



Anna. Mi ne scias, ĉu la Sinjorino estas prava, eliri hodiaŭ posttagmeze. Kredeble baldaŭ pluvos.

S-ino A. (iras al la fenestro). Ho ve, kiel enuige! Fakte jam pluvas. Sur la trotuaro estas grandaj gutoj.

Anna. Mi bedaŭras por la Sinjorino.

S-ino A. Kion do mi devas fari hodiaŭ posttagmeze? — Ĉu labori? Mi ne havas komencitan brodaĵon; tio ĉi memorigas min, ke mi devas iri morgaŭ al la modistino por aĉeti modelojn. — Ĉu legi? Mi ne havas deziron. Ho, kia malagraba pluvo! Kaj ĝuste hodiaŭ ĝi venas. (Oni sonorigas.) Se ĝi estus vizitanto! Anna, tuj rigardu, kiu venas.

Anna (post momento anoncas). Estas Sinjoro C.

S-ino A. Enkonduku lin tuj.

S-ro C. Bonan tagon, kara Sinjorino A.

S-ino A. Estu bonvenanta, kara Sinjoro;volu sidiĝi en tiun brakseĝon kaj diru, kiu favora vento vin alkondukas al mi?

S-ro C. Ĝi ne estas la vento, Sinjorino, sed la pluvo. Mi forgesis kunpreni mian pluvombrelon. La pluvo surprizis min tute proksime de tie ĉi, kaj mi estas devigata, peti ŝirmon de via gastameco. Vi certe trovos, ke mi estas senĝena.

S-ino A. Tute male, vi ne povas imagi, kian plezuron faras al mi via vizito. Malkaŝe mi diras al vi, ke mi komencis enui en soleco. La malbenita pluvo detruas ĉiujn miajn projektojn. Sed nun ni povos pasigi, amike babilante, agrablan momenton.

S-ro C. KREDU al mi, ke mi estas danka al tiu kara pluvo, kiu permesas al mi ĝui, unu fojon plie, vian konversacion.

S-ino A. Tro afable!

S-ro C. Ĉu vi scias, kara Sinjorino A., ke ni devus esti tre feliĉaj, ke fine venis tiu ĉi pluvo, kiun vi malbenas?

S-ino A. Ho, ĝi estus povinta atendi unu tagon plue. Mi devis plenumi hodiaŭ posttagmeze tiom da komisioj.

S-ro C. Vi ankaŭ povos tion fari morgaŭ. Intertempe la sekeco minacis pereigi la tutan rikolton sur la kamparo.

S-ino A. Ne grave, aliaj landoj jam povus provizi nin sufiĉege.

S-ro C. Vi ne pensas pri la mizero, kiun suferus niaj kamparanoj.

S-ino A. Pardonu min, mi parolis tute sen-pripense.

S-ro C. Vi jam estas tute senkulpigita, kara Sinjorino, ĉiu pensas antaŭ ĉio pri sia propra bono, kaj tio estas ja tute komprenebla. Sed kiam ni nur iomete pripensas, ni komprenas, ke ankaŭ estas nia rekta profito, se la pluvo kreskigas la grenojn kaj fruktojn.

S-ino A. Vi fine igos min ami la pluvon.

S-ro C. Kial ne? Ĉu ĝi ankoraŭ ne havas tiun vantaĝon, ke ĝi igas nin pli ŝati la belan veteron kaj la sunbrilon? Ĉu ĝi ne estas sorĉistino, kies magia bastoneto redonas al la soifanta verdaĵo freŝecon kaj brilecon?

S-ino A. Mi ne pensis pri ĉio ĉi.

S-ro C. Kaj kiom helpas ankoraŭ al ni la pluvo, preskaŭ sen nia scio!

S-ino A. (al la servistino, kiun ŝi vokis per sonorileto). Anna, pretigu la teon. (Al s-ro C.) Vi espereble ne rifuzos trinki tason kun mi?

S-ro C. Ne, tre volonte. Nu, vidu, mi ŝuldas al la pluvo agrablan posttagmezon en ĉarma societo, kaj krom tio ĝia akvo havigas al mi tason da bonega teo. Mi diras al la pluvo mian plej sinceran dankon!

---

## En kunsido

A., prezidanto; B., sekretario; C., D., E., F., societanoj.

A. Sinjoroj, ni estas sufiĉe multnombraj kaj decidpovaj. Mi malfermas la ĝeneralan kunsidon de la unuiĝo X. Vi ricevis presitan tagordon de la kunveno. Ĉu iu deziras ŝanĝon aŭ aldonon al ĝi?

C. Mi deziras, ke oni enmetu en la diversajojn diskutadon pri revizio de la statutoj.

A. Mi bedaŭras, tio estas neebla laŭ la teksto mem de la regularo.

C. Mi scias, ke, laŭ la regularo, revizio de la statutoj devas esti enskribita en la tagordon por esti valora. Pro tio mi ne postulas, ke decido okazu hodiaŭ vespere, sed ŝajnas al mi, ke estus utile, se ni povus esprimi opiniojn pri tiu temo.

A. Vi aŭdas la proponon de S-ro C. Ĉu ĝi ricevas apogon?



Kelkaj voĉoj. Aprobata.

D. Mi petas la parolon.

A. S-ro D. havas la parolon.

D. Mi opinias, ke la postulo de S-ro C. ne estu konsiderata hodiaŭ vespere kaj ke ni devas likvidi la tagordon tian, kia ĝi estas proponita de la komitato. La propono de s-ro C. povos esti enskribata en la tagordon de la proksima kunveno. Tiel ĉiuj scios, ke tiu grava temo estos pridiskutata.

E. Mi deziras la parolon.

A. Vi havas ĝin.

E. Sinjoroj, mi tute konsentas kun la propono de S-ro C. Niaj statutoj jam de longe bezonas revizion. Ni povus kontentigi nin kun eventuala diskuto, oni elektus komision por esplori la eldiritajn ideojn. Ĝi povus raporti en la proksima kunsido, kaj tiamaniere ni ŝparus multe da tempo.

A. Ĉu iu ankoraŭ deziras la parolon pri la propono de S-ro C. rilate al hodiaŭa diskuto pri eventuala revizio de la statutoj? Se ne, ni voĉdonos. Mi petas vin, Sinjoroj, voĉdoni per jes aŭ ne. Antaŭe mi petas Sinjorojn B. kaj F., funkcii kiel voĉkalkulantoj. Kiu akceptas la proponon de S-ro C., estas petata, levi la manon. (Pluraj manoj sin levas). Kontraŭa opinio. (Pli multaj manoj sin levas). S-ro B. bonvolu diri la rezultaton de l' voĉdono.

B. La propono de S-ro C. estas malakceptita per 63 kontraŭ 45 voĉoj.

A. Mi pensas, ke S-ro C. konsentos pri tio, ke ni metu la aferon en komencon de la tagordo de l' proksima kunveno.

C. Certe, Sinjoro prezidanto. Mi dankas pro tio.

A. Sinjoro sekretario estas petata, legi la protokolon de la lasta kunsido.

B. Legas ĝin; ĝi estas tre plena.

A. Ĉu iu havas rimarkigon por fari pri la protokolo? Se ne, ĝi estos aprobita tiel. Ĉu oni ankoraŭ deziras la parolon? La protokolo estas konfirmita. Mi certe parolas en la nomo de ĉiuj, se mi dankas Sinjoron sekretarion pro lia detala protokolo. (Montroj de konsento.) Kaj nun ni transiras al la dua punkto de nia tagordo, nome ... (La kunsido daŭras; ĉe la fino:) Sinjoroj, niaj hodiaŭaj aferoj estas nun likviditaj. Kiu deziras la parolon pri diversajoj? ... Neniu. La kunsido estas fermita.

---

## Por fumantoj

S-ro A., fumanto; S-ro B., nefumanto.

A. Ĝoju, kara amiko! Vi triumfas: mi ĉesigas la fumadon.

B. Kial do mi triumfu? Al vi plaĉis fumi, al mi ne. Ni estas liberaj, agi ĉiu laŭ sia gusto.

A. Kiom da fojoj vi diris al mi, ke la trofumado estas malsaniga!

B. Certe, kaj tion mi ripetas.

A. Mi mem faris tiun maldolĉan eksperimenton.

B. Nu, ĉu vi estas malsana?

A. Eĉ grave, mi timas. Mi sentas stomakdolorojn, kapturnojn kaj diversajn simptomojn, kiuj ne lasis dubon al la kuracisto; li sekve malpermesis al mi la uzadon de l' tabako.

B. Mi sincere kompatas vin, mia kara, — ne tion pro via malsano, kiu estas espereble kuracebla, — sed pro la senigado, pri kiu vi suferos. Vi bezonos multe da volforto por forlasi kutimon, kiun vi tiel ŝatis.

A. Tion mi ankaŭ diris al la kuracisto. En mia aĝo ne estas facile, forlasi cigaron, cigaredon aŭ bonan pipon; la kutimo tro fortike enradikiĝis.

B. Jes, kaj la tento estas forta.

A. Mi tre timas, ke post kelkaj tagoj da rezisteco mi denove cedos al ĝi.

B. Mi diros al vi rimedon por fumi sendanĝere.

A. Estas ĉiam la nefumantoj, kiuj konas la plej bonajn artifikaĵojn. Nu, diru al mi vian sekreton.

B. La tuta malbono devenas de la nikotino. Fumu sennikotinajn cigaredojn.

A. Ĉu do ekzistas tiaj en la komerco?

B. Vi mem povas ilin fari.

A. Kiel do?

B. Tre facile. Vi scias, ke nikotino estas solvebla en akvo.

A. Jes, tion mi scias.

B. Metu vian tabakon en akvon. Tiu ĉi fariĝas flava, kaj jen pruvo, ke la nikotino grandaparte eliris.



A. Tiam ĝi ne plu utilas.

B. Ĉu ĝi multe utilas, kiam ĝi malaperas en fumo? Kompense la tiel ricevita akvo povas esti uzata por la detruo de parazitaj insektoj.

A. Do la nikotino utilas por io.

B. Jes, kiam oni ne uzas ĝin por sin detrui mem. Kiam la tabako estas tute lavita, oni elmetas ĝin sur paperfolion kaj lasas ĝin sekiĝi malrapide. La artifiko estas farita!

A. Tio estas efektive tre simpla; pri tio mi ankoraŭ ne pensis.

B. La scienculoj certigas, ke la procedo estas efika.

A. Mi parolos kun mia kuracisto pri tio.

B. Mi kredas, ke li permesos al vi, fumi tian tabakon. Mi havas multajn amikojn, kiuj tre ŝatas ĝin.

A. Dankon pro la instruo. Sed estas strange, ke vi, abstinenculo de tabako, donas konsilojn al fumanto, por ke li povu kontentigi sian pasion.

B. Kial ne? Mi preferas vidi miajn amikojn feliĉaj ol malfeliĉaj. Fumanto senigita de siaj bluaj fumnubetoj estas tiel malfeliĉa!

A. Sed ĉu via lavita tabako ne estas tute sengusta? Ĝi devas esti io kvazaŭ senalkohola vino.

B. Prave, sed restas la iluzio, kaj ĉe la fumado iluzio ludas grandan rolon, eble pli grandan ol en iu alia afero.

---

## Pri la karaktero

A., malforta karaktero; B., energia, decidema viro.

A. Ho ve, kara Sinjoro, mi estas tre malfeliĉa!

B. Kio denove okazis al vi?

A. Imagu! Mia edzino ree estas malsana.

B. Ĉu grave?

A. Mi ne scias. Ŝi havas kapturnon, estas revema, sentas sin laca kaj estas apenaŭ kapabla, prizorgi la mastrumadon.

B. Flegu ŝin, donu al ŝi fortikigajn kuracilojn, kaj precipe ŝi devas ofte promeni en libera aero.

A. Oni vidas, ke vi konas ŝin tre malbone. Ŝi fariĝas ĉiam pli hipokondra, abomenas troviĝi en societo kaj nevolonte eliras el la domo. Kaj tio daŭras jam de pluraj monatoj.

B. Ĝuste tie kuŝas la danĝero; se vi ne kontraŭagas, via edzino fariĝos neŭrastenia.

A. Vi igas min tremegi.

B. Nu, vi ĉion trograndigas. Estu do iom pli vireca, mia kara.

A. Al vi estas facile paroli. Sed kiam oni estas senĉese persekutata de la malfeliĉo, oni perdas la kuraĝon.

B. Oni ne devas lasi sin venki de la malfeliĉo, kuraĝa viro leviĝas super ĝin.

A. Kiel vi parolas! Videble la malfeliĉo neniam atingis vin.

B. En tio vi tute eraras. Dum mia vivo mi travivis terurajn krizojn, mi elportis kuraĝe la batalon kaj eliris el ĝi pli forta.

A. Mi admiras kaj envias vin. Mi ne havus tian forton.

B. Tamen, tre facile estas. Sufiĉas voli.

A. Sed ĝuste tio estas plej malfacila, akiri volkapablon.

B. Grava eraro. Mi mem dum mia infaneco estis timema, hezitema; sed mi kontraŭbatalis tiun malbonan karakterecon. Iun tagon mi diris al mi: „Viro senkarakterata ne estas viro kaj atingas nenion. En iu cirkonstanco mi estu forta, kaj de tio rezultos nur bono por mi.“ Kaj efektive mi ĉiam spertis, ke tio estas vera.

A. Ĉu neniam okazis, ke vi vojeraris?

B. Jes, kelkafoje, sed mi ankaŭ malkaŝe ekkonis mian eraron, kaj neniam mi pentis pri ĝi.

A. Vidu, mi sentas, ke por mi tio estas neebla; tro malfrue! Oni ne povas ŝanĝi sian naturon.

B. Vi tute eraras, mia amiko. Fatalismo estas unu el la plej danĝeraj teorioj elpensitaj de homo. Sed ĝi estas ja nur teorio.

A. Vi devos rekoni, ke kelkaj homoj naskiĝas senenergiaj, dum aliaj estas laŭnature vivecaj.

B. Jes, vere, heredeco ekzistas. Sed edukado povas plibonigi la malegalecojn de l' naskiĝo. Firma deziro de korektiĝo povas, kun persisteco, fariĝi volo kaj ago.

A. Mi sentas, ke mi ne havus la kuraĝon. Bagatelo neniigas mian volon.



B. Provu. Ĉe tio ĉi, kiel en aliaj aferoj, nur la komenco estas malfacila.

A. Facile vi parolas pri tio. Kiam ĉio ligas sin kontraŭ unu homo, neeble estas kontraŭstari.

B. Jes, kiam oni ne kuraĝas rigardi la malfeliĉon rekte en la vizaĝon. Dangero estas malpli granda, kiam oni ne timas ataki ĝin.

A. Ha jes ... oni devas kuraĝi ataki ĝin.

B. Nu, kiam via kurteno brulas, ĉu vi lasas la fajron atingi la lignaĵon kaj ekflamigi la tutan domon kaj poste diras: „Vidu, mia domo brulas, neeble estas al mi, estingi la fajron?“

A. Komparo ne estas racio; tio tute ne rilatas al nia konversacio.

B. Kontraŭe, tio tre proksime rilatas. Plej ofte oni estus povinta eviti grandan malfeliĉon moralan aŭ fizikan, se oni estus evitinta la malgrandan kaŭzon, kiu ĝin okazigis.

A. Mi vidas, ke vi estas prava. Mi klopodos reagi super la karaktero de mia edzino.

B. Kaj ankaŭ super la via. Ĉar firma volo imponas al alia malpli firma.

A. Ha, se mi nur havus duonon de via volo!

B. Nu, komencu kun kvarono, kaj vi baldaŭ havos ĝin tute. Memoru, ke sendecida viro estas elmetita al ĉiuj influoj kaj ke firma, sendependa volo estas unua kondiĉo de morala valoro.

A. Mi profitos de viaj paroloj.

B. Kaj meditu pri la praveco de tiu ĉi tiel vera penso: „La plej malbona karaktereco estas la senkaraktereco.“

---

## Patriotismo kaj ŝovinismo

A. Ĉu ankaŭ vi, kara amiko, ne trovas, ke la ideo pri patrujo estas malnoviĝinta?

B. Kial do? Ĉar kelkaj primokas ĝin? La amo al patrujo ekzistas de eterneco; ĉu ĝi ne instigis grandiozajn farojn, kiuj inspiras admiron kaj entuziasmon?

A. Tro ofte tiuj agoj estis pagataj per sang-elverŝoj. Por kiu celo? Por novaj konkuroj! Bela progreso! La herooj de l' scienco, jen la solaj laŭdindaj.

B. Mi konsentas, ke estas en la historio de la popoloj abomenaj paĝoj, ŝuldataj al falsa patriotismo. Sed diru, mi petas, en kiu stato estus la homaro sen tiu potenca instigilo de l' konkuro inter nacioj pro la supereco?

A. En antaŭaj tempoj eble estis utila, eĉ bona, tia divido inter popoloj. Hodiaŭ la vaporo kaj elektro neniigis la landlimojn. Ĉiuj homoj nun estas fratoj.

B. Ĉu la amo al patrujo devige faras el ili malamikojn? Jen grandega eraro, en kiun multaj falas sensuspekto. Patrujo kaj homaro estas du konceptoj, kiuj ne malkonsentas inter si. Ili kompletigas sin reciproke.

A. Tamen ekzistas homoj, por kiuj la koncepto pri patrujo estas la sole vera, akceptebla kaj admirinda, kaj kiuj la tutan tagon predikas pri malamo al fremdlando.

B. Ili estas malpravaj, tute same kiel tiuj, kiuj malkonfesas la patrujon pro amo al internacieco. Al ambaŭ simple mankas unu sento.

A. Vi do kondamnas la ŝovinismon?

B. Mi ĝin abomenas. Cetere ĝi estas nur malsaneca aperaĵo, kaj mi demandas min, kial oni ĝin ĉiam emas konfuzi kun patriotismo, ĉar fakte ĝi estas nur malbela, malnobla karikaturo de patriotismo.

A. Sed la ŝovinistoj ĉiam havas en la buŝo la nomon de patrujo por prediki pri malamo al eksterlando.

B. Ĉu vi ne vidas, ke ankaŭ ofte delirantaj cerboj uzas la belan nomon „humaneco“ por dissemi ideojn de malpaco, malkonsento, disiĝo inter homoj?

A. Unu eksceso elvokas alian.

B. Ĝis certa grado mi konsentas. Sed ĉu la morala beleco de la religio estas malpli alta, ĉar kelkaj kovris siajn hontindajn agojn per ĝia mantelo? Ne, ĉu ne vere?

A. Kompreneble, oni ne povas kulpigi la patrujon pri ĉiuj krimoj faritaj en ĝia nomo. Sed tiaj estis kaj estas ankoraŭ nun farataj. Oni forigu la kaŭzon, kaj ĝia malbona efiko samtempe malaperos.

B. Ĉu vi tion vere kredas? Erarega opinio! La feliĉo de l' homaro dependas nur de la feliĉo de la nacioj. Ĉu oni neniigis la familiojn pro la patrujo? Kaj se ĉiuj familioj estus feliĉaj, ĉu la patrujo ne estus ankoraŭ pli feliĉa?

A. Pardonu, la familio estas fakto, dum la patrujo estas nur abstraktaĵo.



B. Ĉu la ideo pri homaro ne ankaŭ estas abstraktaĵo?

A. Jes, sed pli alta kaj nobla, ĝi forigas la malamon inter popoloj.

B. Por anstataŭi ĝin en multaj okazoj per malamo inter socialaj klasoj. Ambaŭ malamoj estas egale abomenaj.

A. Sed kiel oni povus ilin detrui?

B. Nek vi, nek mi povas solvi tiun ĉi grandan problemon, pro kiu tiom da pensuloj rompas sian kapon. La ideo pri patrujo povas naski noblajn agojn, tion vi do ne neas?

A. Tute ne, mi eĉ konfesas ĝin tre volonte.

B. Bone, en la nomo de tiu ĉi ideo ni do kunlaboru por la bono de la nacioj. Ni forpelu la ŝovinismon, kaj ĉiu patrujo estos egale enviinda.

A. Tiam la patrujoj mem malaperos!

B. Tion mi ne kredas; sed la popoloj vivos pace. Atendante, ni ĉiam estu pretaj, defendi la terparton, kie ni vivas kun niaj familioj. Oni malbone konas la verajn intencojn de la najbaroj, kaj la homaro ne estas ankoraŭ perfekta. Ni estu singardemaj, atendante pli feliĉajn tempojn.

---

**Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.**  
**Berlin kaj Dresden**

---

# **Dokumentoj de Esperanto**

**Informilo pri la historio kaj organizo  
de la Esperanta movado**

**Kunmetita de  
Dro A. Möbusz, Lübeck**

**Prezo laŭ nia plej nova prezolisto**

Ĉiu Esperantano, kiu volas informi sin pri la historio kaj scienca bazo de la Lingvo Internacia, pri la Esperanto-movado kaj pri la organizo de la Esperantistaro, nepre devas posedi ĉi tiun fundamentan verkon. La libro enhavas i. a. ĉiujn kongresparoladojn de Dro Zamenhof kaj multajn aliajn gravajn dokumentojn. Ĝi estas tre necesa preparilo por Esperantaj ekzamenoj.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.  
Berlin kaj Dresden

# Demonstraciaj tabeloj

pri la konstruo de la lingvo Esperanto.  
Helpilo por propagandaj paroladoj kaj  
la Esperanta instruado.

Laŭ didaktikaj vidpunktoj kunmetis  
**Dro A. Möbusz, Lübeck.**

8 tabeloj, formato 80 × 106 cm.  
Prezo laŭ nia plej nova prezolisto.

## ENHAVO:

- |                                |  |
|--------------------------------|--|
| I. La alfabeto.                | VI. Konjugacia tabelo<br>laŭ latina skemo.                   |
| II. La deklinacio.             | VII. La afiksoj.   |
| III. La numeraloj.             | VIII. Esperanta prova<br>teksto por legado<br>kaj tradukado. |
| IV. La formaj vortoj.          |  |
| V. La verbo<br>(ĉefaj formoj). |  |

Ĝis nun estis pli-malpli malfacile, montri al la publiko dum propaganda parolado la simplan konstruon kaj la regulecon de nia lingvo. Tiun postulon plenumas la „Demonstraciaj tabeloj“ en plej bona maniero. Aliflanke la tabeloj plenumas ŝatindajn servojn dum la instruado, precipe se tiu lasta okazas en ĉambro, kie ne estas mur-tabulo je la dispono de la instruanto. La aranĝo estas klara kaj la skribo sufiĉe granda, tiel ke eĉ en grandaj salonoj la tabeloj estas uzeblaj.



# Nova Esperanto-Biblioteko

---

---

## a) Pri la mondmilito

- No. 1.** La kulpo de Entente. Konciza resumo kunmetita el oficiala materialo.
- No. 2.** La efikoj de la U-boata milito. Laŭ oficialaj elmontroj el komenco de Aŭgusto 1917.
- No. 3/4.** La granda mensogo. Traduko de la angla broŝuro „Tsardom's part in the war“ de E. D. Morel.

## b) Bela literaturo

(Ĉiuj volumoj estas bele kartonitaj)

- No. 5.** **Argus: Pro kio?** Internacia kriminalromano originale verkita.
- No. 6.** **Heine, Heinrich:** Elektitaj Poemoj. El germana lingvo tradukis Friedrich Pillath. Dua, kompletigita eldono.
- No. 7.** **William, P.:** Legolibro. Ia volumo: Internacia Anekdotaro.
- No. 8.** **Hauff, Vilhelmo:** La kantistino. Novelo. El germana lingvo tradukis Eugen Wüster.
- No. 9.** **Barbusse, Henri:** 11 elektitaj noveloj. El franca lingvo tradukis Alexandra Mexin. (En preparo.)
- No. 10.** **Lessing, Gotthold Ephraim:** Natan la Saĝulo. Drameca poemo en kvin aktoj. El germana lingvo tradukis K. Minor. (En preparo.)

Prezoj laŭ nia plej nova prezolisto.  
(La kolekto estas daŭrigota.)

---

---

**Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.**  
**Berlin kaj Dresden**

- No. 3. Bona Sinjorino, novelo de E. Orzeszko, tradukita el pola lingvo de Kabe.
- No. 4. Rusaj Rakontoj, de Mamin Sibirjak, tradukitaj el rusa lingvo de N. Kabanov.
- No. 5. Don Kihoto en Barcelono, tradukita el hispana lingvo de Fr. Pujulà y Vallès.
- No. 6. El la Biblio, trad. Dro L. L. Zamenhof.
- No. 7. El Dramoj (fragmentoj), tradukitaj el germana lingvo de Dro L. L. Zamenhof.
- No. 8. El Komedioj (fragmentoj), esperantigitaj de Dro L. L. Zamenhof.
- No. 9. Praktika Frazaro. Dialogoj de la ĉiutaga vivo, kunmetis J. Borel.
- No. 10/11 (duobla numero). Japanaj Rakontoj. El Japana lingvo kunmetis Ĉif Toŝio.
- No. 12. Reaperantoj. Familia dramo de Henrik Ibsen (1a akto), trad. el norvega lingvo de O. Bünemann.
- No. 13. Bulgaraj Rakontoj, el bulgara lingvo tradukis At. D. Atanasov.
- No. 14/15 (duobla numero). Amoro kaj Psiĥe de Lucius Apulejus, el latina lingvo tradukis Emilo Pfeffer.
- No. 16. Komerca Korespondo, kunmetis J. Borel.

- ...siloj pri Higieno, Borel.
- Rego de la Ora de John Ruskin, el la angla lingvo tradukis Ivy Kellermann, A. M., Ph. Dr.
- No. 19. Sinjoro Herkules. Unuakta burleskaĵo de Georg Belly, el germana lingvo tradukis H. Arntz kaj M. Butin.
- No. 20. La lasta Usonano de J. A. Mitchell, el la angla lingvo trad. Lehm. Wendell.
- No. 21. Hungaraj Rakontoj de Ferenc Herczeg, el hungara lingvo trad. A. Panajott.
- No. 22. Nord-germanaj Rakontoj de Heinrich Bandlow, el platgermana lingvo tradukis Ella Scheerpeltz.
- No. 23. Hispana Dramoj de Jacinto Benavente, tradukis Vicente Inglada.
- No. 24. La Instituto Milner de Jean Jullien. Trad. el franca lingvo la Lyon-a grupo.
- No. 25. Noveletoj el la Nigra Arbaro de Hel. Christaller. Trad. el germana lingvo Wilh. Christaller.
- No. 26. La intervidiĝo kaj Nekonita Dialogo de Alfred de Vigny, el franca lingvo trad. Sam. Meyer.
- No. 27. La Patrino de Ernst Zahn. El germana lingvo trad. J. Šmid.
- No. 28. Elzasaj Legendoj. El germana lingvo tradukis Charlotte Pulvers.

Prezroj laŭ nia plej nova prezolisto. La kolekto estas daŭrigota. Kelkaj numeroj estas provizore elĉerpitaj, sed ili estos represataj unu post la alia.

Ĉiu libreto enhavas 40—50 pagojn.

**Esperanto-Verlag Eilersiek & Borel G. m. b. H.**  
Berlin kaj Dresden